

Literatura Mondo, 4-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 463, 1972.08.23 & 26

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj someraj elsendoj ni rigardas al la revuo *Literatura Mondo*, kiu naskiĝis antaŭ kvindek jaroj kaj tiom influis la esperanto-kulturon.

A.- La unua pioniro de esperanto en Ĉinio estas Won Kenn, kiu instruis beletristikon en la Universitato de Kanton kaj lernis nian lingvon antaŭ la unua mondmilito. En la revuo *Literatura Mondo*, oktobro 1923, aperis de li interesa artikolo pri la temo : *Ĉina versparo en Esperantaj poemoj*.

Cl.- Ni citos el tiu artikolo de Won Kenn. Aŭdu liajn klarigojn :

A.- « *Oni tre ofte trovas en ĉina poemo versparon, en kiu la poeto metis du versojn tute paralelajn, tute ekvilibrajn, kiuj korespondas unu la alian je la nombro da vortoj kaj silaboj, je la gramatiko, kaj plie, je la komuna karakteriza speco al kiu la vortoj apartenas. [...] Tio ja ekzistas kelkfoje en Esperantaj poemoj !* »

Cl.- Won Kenn donas la sekvajn ekzemplojn :

A.- « *Kaj homo mizera
Kun kredo sincera*

Cl.- *Kuŝas somero la varma
Sur via rozeta vangeto,
Kuŝas la vintro malvarma
En via malgranda koreto. »*

A.- Kaj Won Kenn daŭrigas : « *Tio ja estas bona ekzemplo de bela Esperanta versparo. Ĝi eĉ ekzistis en malnova tempo – sin trovas en la Fundamenta Krestomatio. Ankoraŭ estas kelkaj aliaj, la nomojn de iliaj aŭtoroj, tre bedaŭrinde, mi ne povas citi.*

Cl.- *Li ridegas je la nuboj
Li ploregas pro la ĝojo.*

A.- *L'Animo estas rompita
La ĝojo mortis trompita.*

Cl.- *Regno konata
Al progresuloj !
Tero benata
De l' pacienculoj !*

A.- *Ankoraŭ estas multaj kiuj, kvankam ne similas la antaŭ-cititajn, tamen estas bele paraj :*

Cl.- *De lingvo, por la lipo,
De amo, por la koro !*

A.- *Jen, mi vivas por Maruŝka,
Jen, mi mortos por Maruŝka.*

Cl.- *Joska, kial por mi vivi ?
Joska, kial por mi morti ?*

A.- *Sed neniam mi trovas paron pli belan kaj pli bone elpensitan ol la jenan ; ĝi estas el Julio Baghy) :*

Cl.- *La vestojn ŝiras frosta vent' .
La korojn tordas larma sent' .*

A.- *Mi devas pretendi, daŭrigas Won Kenn, ke la poeto metis kun bona intenco sian duversion en ĉarma, bela, harmonia paralelo kaj ke li havas ĝuste la saman penson kiel la ĉinaj poetoj, ne parolante pri tio ĉu li konas la ĉinan lingvon. Li tute ne skribis tion senintence. Ankoraŭ estas alia poeto, kiu posedas la saman talenton kaj kiu skribas tre ofte versparojn vere ĉinajn. Mi permesu al mi citi ilin :*

Cl.- *Blovas ventet' de vespero
Plaŭdas ondet' de rivero.*

A.- *Super lag' nebul' volviĝas,
Rampas kiel fum',
Super akvo arb' kliniĝas,
Brilas pala lum!*

Cl.- *Sun' leviĝis – jen ridetas,
Park' vekiĝis kaj ripetas.*

A.- *Ĉiam kaj ĉie mi trovas ĉarman kaj bele verkitan versparon en la nuntempa Esperanta poezio, [estas] multe pli facile ĝin trovi nuntempe ol en la epoko zamenhofa kaj mi, laŭ vidpunkto de orientano, rimarkas ke la Esperanta literaturo jam estas enirinta novan epokon, epokon multe pli florantan, kun karaktero kaj gusto alia, malsimila al la antaŭa, ĉar, se mi tre zorge kaj atente ĝin ekzamenas kaj analizas, mi povas pretendi ke la epoko hodiaŭa tute similas nian epokon de la “Ses dinastioj” (200 post Jesuo Kristo) en kiu naskiĝis kaj iom post iom floris la versparo, dume, la epokon zamenhofan mi povas kompari kun nia unua literatura epoko (mil antaŭ Jesuo Kristo) kiu posedis karakteron grandan, simplan kaj majestan. »*

Cl.- Won Kenn aldonas : « Kaj nun venas mi al du konkludoj :

1-e, ke la Esperanta literaturo en sia evoluado havas ĝuste la saman tendencon kaj direkton kiel la literaturo ĉina, kies belecon, historion kaj lingvan valoron neniu povas ignori.

2-e, ke la Esperanta literaturo posedas veran universalecon kaj internaciecon, en kiu ekzistas eĉ la ĉina versparo, bela, harmonia, ordema sed nekonata al multaj landoj. »

A.- La artikolo de la ĉina esperanto-pioniro Won Kenn, kies erojn ni ĵus legis al vi, aperis en la revuo *Literatura Mondo* en oktobro 1923.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!